I-a Jaro - N° 6 MEDEDEELINGEN Mei 1942.
(uitsluitelijk voor de leden)

= A N T A U E N =

Redakcio kaj eldono: estraro de la bruĝa E°-grupo "Paco kaj Justeco"

x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x

HISTORIO PRI LA EKESTO, KRESKADO KAJ FLORADO DE NIA ESPERANTO-GRUPO "PACO KAJ JUSTECO"

(2-a daŭrigo)

La tagoj kaj monatoj ekde nun eĉ tro rapidege forflugis por la laborego farota. Sed ekzakte je 4-a de Junio 1938 la LoKoKo estis tute preta. Ni nepacience atendis la pesttagmezon t.e. la alveno de la geesperantustaro. Ni tuj diru ke la Pentekostaj tagoj estis ĉeno de sukcesoj tiel bone por la flandra Esperanto movado kiel por nia sekcio.
La programo kiun la estraranoj mem starigis,oni tute ellaboris kaj senescepte ĝi plaĉis al ĉiuj gepartoprenintoj.Ĉiu kategorio da personoj trovis dum la kongrestagoj ion laŭ sia emo: ĉu la sonorilarkoncerto; ko en la monfamkonata kapelo de la Santa Sango; ĉu la bankedo; ĉu la artvespero kun deklamado,kantado, teatraĵo ktp.; ĉu la oficiala akcepto en urbdomo kun la salutparoladetoj de deligitoj de kvin nacioj; ĉu la boatveturado sur bruĝaj kanaletoj aŭ ĉu la ekskurso sur vaporŝipi "Jacob van Maerlant" al mezepoka Damme dum banjoludistoj aŭdigis nian kongreshimnon.
Kaj la orhanizintoj ? Ankaŭ al ili plaĉis la kongreso ĉar ili ĝuis kaj fierigispri la sukcesego nekredebla (preskaŭ 300 gepartoprenintoj) kaj - precipe por du organizatoroj - pri piedpilkkonkurso kontraŭ dekunuo de Kortryk gajnita.Fotoj de ĉiuj okazintaĵoj por ĉiam memorigas nin la neforgeseblajn tagojn.
Tiamaniere la aventuro - verdire ĝi nur estis aventuro por organizi kiel novfondita grupo kongreson - finiĝis kaj eĉ bonege sukcesis.Decas laŭdi ĉi-tie la 5 gepionirojn de tiuj malfacilaj tagoj,nome Fernand Roose Iserentant Roger,Alfons Blontrock,Maria Vincke kaj Camiel Vanden Bussche (la tri lastaj laŭorde bedaŭrinde jam forlasis aŭ la grupon aŭ la movadon
Niaj junaj gesamideanoj ne pensu ke ni,kun la kolektitaj laŭroj,lacere ripozis en paco post bonfinita tasko.
Tute ne,eĉ kontraŭe,ju pli ni rikoltis sukcesoj des pli ni efektivigis novajn planojn.Apenaŭ la kongrestagoj for ni organizis biniklan ekskursegon irikaj revene al Gent por ĉeesti la tie okazintan Flandran Nacian. Kantfeston.La bruĝa sekcio estis la sola kiu akceptis la inviton de la gentaj gesamideanoj veni grupe al la Artebelde urbo (3-a de Julio 1938). Kelkaj semajnoj poste ni organizis aŭtobuŝan ekskurson al Kortryk je invito de la E-klubo de tiu urbo por reludi la piedpilkkonkurson en kiu tiu grupo malvenkis kontraŭ nie dekunuo dum la kongrestagoj.22-ope ni veturis al la urbo de Groeninghe.La vojaĝo ĉiurilate sukcesis: belega somera vetere kaj la konkurso kiun ni gajnis per 2 celpunktoj kontraŭ I.Ankaŭ la pokalon,donita de estrarano de Kortryk honore de la venkanta dekunuo,ni dekunportis al Bruĝo.Ni menciu tutspeceale ke antaŭ l'komenco de la ludado la kapitano de la kortryka dekunuo nin oferis florbukedon belegan kiun ni post la konkurso metis al la soklo de l'Groeningje monumento dum ke ĉiuj ĉeestantoj ekkantis la flandran himnon.Post la veto ni ĉiuj nin gajege amuziĝis fratigante kun la genembroj de la grupo el Kortryk.Estis jam tut malhela kiam ni finfine alvenis hejmen - ni dumvoje haris ankoraŭ en Ingelmunster kie okazis foiro - ĉiam kantante kaj kriante pro ĝojo pri la neforgesebla tago.
"Ne laciĝante" - la vortoj de nia Majstro - ni finjulio biciklis grupe al Veurne por admiri la procesion de la gepentofaruloj.Dum monato Aŭgusto ni ja kuraĝis viziti la aristokratan banlokon Knokke-Zoute.Panjo Siska por ni estis la ĉefa allogo kaj la kukoj malapreis en niaj stomakoj tiel facile kaj rapide kiel neĝo fondas pro sunradioj... ne gravas,geamikoj, estas nut la grupkaso kiu pagis.Forte pro la man ĝaĵoj ni esploradis en la dunoj.Ludante kaj sin amuzante ni vagadis kaj zigzagadis inter la sablomontetoj ĝis kiam ekvesperiĝis.Nur tiam ni pensis al hejmirado sed tiam ankaŭ la situacio iĝis kritika.Pripensu momenton: jam vespero- meze en la dunoj - neniu orientigpunkto.Feliĉe ke ankaŭ por geesperantistoj-almenaŭ por la bruĝaj - ekzistas angelo-gardanto kaj tiamaniere ni tamen kwamkam mortlacaj sed kontentaj,hejmalvenis.Nur du membroj kiuj ne posedi

biciklan lumigilon devis vagonaro reveni (preskaŭ ili mankis la lastan) kaj du aliaj pro bicikla defekto longe post la noktmezo atingis bruĝon. Jen la lasta heroaĵo de nia somera programo.

Kaj denove ni komencis la vintran agadon: ĉiusemajne regulaj kunvenoj en nia ejo; sur la tagordo: deklamado,kantado, paroladoj,gramatiko kaj ludado.Dum monato Septembro ni 3-ope veturis al Antverpeno ekde la Sabato por ĉeesti E-feston en salonego "De Pelikaan" (organizis la "Flandrema") kaj ka posta tago ni finkciis kiel deligitoj de nia sekcio en la ligkunveno.Tiel alvenis la fino de tiu jaro fruktdona kun du gravaj projektoj en la kapoj de la estraranoj: nome I°-plano por ree organizi vintrokurson kaj ideo por aĉeti belan E-grupflagon.

JARO L939 :

La 19-a de Januaro okazis paroladvespero kiel enkonduko al la kurso donita de nia prezidanto F. Roose.La publika interesego superis ĉion krebelan.La granda salono de la junulgastejo estis senplena.Al la unua leciono ĉeestis 36 gepartoprenintoj.Antaŭvidaĵoj do estis rozkaloraj. Poste ni bedaŭrinde spertis la veron de la biblia teksto:"Multaj estas vokitaj sed malmultaj elektiĝis".Car ekde nia starigo la estrardevizo eĥis:"Kvalito antaŭ kvanto" ni ne nepre ĉagreniĝis pro la perdo.

La monato Februaro restos kun oraj literoj en la historio de nia grupo: nia flago iĝis preta kaj dum gaja kaj bongusta bankedo ni ĝin inaŭguris la 6-a de Marto 1939.Cni eterniĝis la ĝojigan fakton per fotografaĵo kaj je nia kontenteco (ni penso nur al la propagando senpaga) ĝi aperis en diversaj gazetoj.

Jam estis fino de Marto kaj je Pentekosto (fino de Majo) 1939 okazus en Antverpeno la X-a Jubilea Kongreso de Flandra Ligo Esperantista. Ciusemajne la estraro instigis la gemembraron al partoprenado al la kongreso.Ni volis montri al la antverpenaj gesamideanoj ke nia grupo tiel sensignifa kiel ĝi estis je nombro de gemembroj ramen kapablis proporcie grandnombre alveturi al la metropolo.La senĉesa propagando inter nia gemembraro estis fruktodona: 7 gemembroj (tiam proksimume la triono de niaj gemembroj) decidis partopreni al la tritaga restado en la havenurbo.Kio okazis dum la kongrestagoj ? Kiamaniere la bruĝanoj tie pasigis tiujn Pentekostotagojn ? Cu la kongreso plaĉis al ili ? Jen demandoj kiuj mi certe povus tuj detale respondi sed mi tamen preferas min fidi al la sprita raporto kiun nia samklubano Roger Derdeyn faris post la vojaĝo celante per ĝi interesigi la hejmgerestintajn kamaradojn dum unu de nuaj grupkunvenoj.Jen lia raporto kiu detale kaj sprite priskribas la travivaĵojn de niaj 7 bruĝanoj dum la X-a jubilea kongreso.

(daŭrigota)

(skribis por la revuo R. I.)

ANGULETO DE LA POEZIO:

Ni hodiaŭ prezentas al niaj gelegantoj la belegan kaj tre konatan kanton flandran "Onze Lieve Vrouw van Vlaanderen"; la flandra teksto estas de A. Cuppens kaj la muziko de L. De Voght.La semideano E. Paesmans majstre prizorgis la E-tradukon.

NIA SINJORINO DE FLANDRUJO.

Ja sennambrajn belajn nomojn
Al Vi donis pia am',
Sed neniu Flandrajn korojn
Tiom plenĝojigis jam,
Kiom nom', ho Dipatrin',
Ne donata al reĝin',
Kiu sonas el tutlando:
Sinjorin' de Flandrolando (bis)

Kien oni ajn promenas
Cu tra kampoj, ĉu arbar',
Ciam oni vin renkontas
Cirkaŭitan de florar',
Vi ĝentile vokas nin
Por eterne ami Vin;
Benu nin en nia lando
Vi,Reĝin' de Flandrolando (bis)

Ciam tronu en la koro
De la Flandra famili',
Kiel bona patrineto,
Vi nin amu tie ĉi
Kaj sur la malbona ter'
Savu nin el la danĝer',
Nin, kun nia kara lando,
Vi,Patrin' de Flandrolando (bis)

(E. Paesmans)

8888888888888

NIAJ GEMEMBROJ RAKONTAS : "Libera tribuno" NI FORIGU LA ALKOHOLON.

En nia distrigvivo ni devas ĉiam zorgi ke ni uzas tiajn plezurilojn kiuj alportas al ni,ĝu korpe,ĉu anime,ian utilon.Uzo de plezuriloj kiuj ne alportas ian utilon estas kontraŭracia. Uzo de plezuriloj kiuj alportas ian malutilon,ankaŭ la plej malgrandan,estas kontraŭnatura.Post la mondmilito de 1914-18 ekstaris multaj internaciaj junulorganizoj kiuj akcelis pli racian kaj pli naturan vivon.Ili kreis tute novan atmosferon,kaj diskonigis tute alian distrigvivon.Tiuj kiuj havis la felicon veni en kontakto kun ili,povas atesti ke ili ne tromigis sed ke ili malkovris novan ravo belan kaj sanigan kaj ĝojplenan movadon.

En nia batalado kontraŭ la alkoholo,ni tre ofte trovigas antaŭ tiu-ĉi riproĉo: la alkoholo estas kelkfoje necesa.Kiam oni estas en festo dum kiu oni volas havi post laciga laboro,la bezonatan plezuron, la alkoholo estas necesa.Gi gajigas la homojn,paroligas ilin,varmigas ilin, sercigas ilin.Gi envenigas atmosferon de petolemo kaj sprito,kiun oni ne sukcesas havigi al si sen la alkoholaj trinkaĵoj.Tre ofte niaj propagandistoj post tia argumentado restas silentaj; ili ne kapablas rifuti ĝin kaj eĉ konfesas ke tio estas efektive la sola kazo en kiu alkoholo devus esti permesate de tempo al tempo.Kiel estas eble ? Se oni volus pripensi dum 6 minutoj ni tuj malkovrus la malveron de tia argumentado.

Unue mi diru ke mi tre priplendas la homojn al kiuj la alkoholo devas doni la gajecon kaj spritecon.Mi demandas al mi,se la alkoholo devas ĉion-ĉi doni al ili,kion ili havas de si mem ?

Sed jen kion mi jam ofte rimarkis en kompanio: holoj kiuj laŭnature ne estas spritaj kaj kies diraĵoj tute ne estas bone eltrovitaj,eĉ tre stultaj,tiuj homoj generale,preskaŭ sen esceptoj,nerimarkas la stultecon de siaj paroloj.Tamen ili restas gajaj malgraŭ la malspriteco de siaj eldiroj.Tiuj do ne bezonas alkoholaĵojn.Se ili tamen uzas alkoholaĵojn la nivelo de iliaj spritaj kaj sercaj paroloj tute ne plialtigos. Ili restas egale absurdaj.La sola afero kiun alportis la alkoholo estas tre ofte ke ili forgesas sin mem kaj diras iojn pri,kiuj ili rugigus en normala stato.Tiuj homoj kiuj estas laŭnature spritaj,evidente ne bezonas alkoholaĵojn.Estas kategorio de homoj kiuj en stato de absoluta neebrieco ne kapablas ion diri.Kontraŭe,kiam ili estas trinkintaj kelkajn glasojn,ili kapablas multon diri. Bedaŭrinde ke la alkoholo devas doni tion al ili.Ili eduku sin mem al spritaj holoj.Tio estas ebla.Per tio mi volas fini.Mi volas doni rimedon per ĝi sprita.Post iom da ekzercado vi jam cidos rezultatojn.Neerareble ĝi estas.Pripensu,pensadu,longtempekaj ofte.Pensadu pri la vivo kaj la holoj.Pensu pri la eternaj valoroj kaj pri kio eterne restas.Komparu al tio la malmultvalorajojn kiujn estimas la homoj.Tio estas neelĉerpebla fonto de humoro.Estu vi mem logika en ĉio kion vi faras kaj prenu ekstremisman starlokon en la batalo por ĉio kio estas bona.Komparo al tio la mallogikecon de la homoj kaj iliajn kapitulaciojn ĉiutagajn.Ankaŭ tio estas neelĉerpebla fonto de humoro,gajeco kaj spriteco.

Grava rimarko: p r i tiu artikolo kaj cetere pri ĉiuj kiuj eventuale estus ensendataj sub "Libera Tribuno"-rubriko,la estraro forigas kiu ajn respondeco.La geensendantoj mem,kiuj devas subskribi je ilia propra nomo,havu la respondecon.Kiu ajn povas sub "Libera tribuno" respondi aŭ kontraŭbatali la en tiu-ĉi rubriko publikitajn artikolojn

888888888888

LITERATURA ANGULO: a) citaĵo el verkaro de Rusa aŭtoro.

"Oni devas estimi la homojn ne lam iliaj deveno kaj ricaĵo sed laŭ la lavoro,kiun ili faras.Ju pli utila estas tiu ĉi laboro,des pli estimindaj estas la homoj.Sed ofte estas la kontraŭa: oni estimas la malokupigemajn riculojn kaj ne estimas tiujn,kiuj faras la plej utilajn laborojn por ĉiuj - la teristojn,la laboristojn".

(L. Tolstoj)

b) ni foje iom ridu.

MALFACILA FACILIGO.

Foje, post vizito ĉe unu mia amiko - samlandano en Grancujo,mi vojagis reen en mianlogurbon,Parizon.Enirinte la vagonon,mi trovis en ĝin jundan sinjoron oscedantan pro solena enuigo.Kiam miaj okuloj alkutimigis al la laca lamplumo de l'vagonfako,mi rimarkis esperantistan steleto en lia butontruo.Oni facile povas presenti al si mian ĝojon,car mi, Hungaro, neperfekte parolas francan lingvon.

- Bonan vesperon, sinjoro - mi diras al li,proponante panpremon. reciproka ekĝojigo,enterbabilado,ktp.

Dum la halto de la vagonaro ĉe unu stacio mi eliras el ĝi por trinki glaseton da biero.Post mia reenvagoniĝo mi proponas al mia kunvojaĝanto fari la samon,ĉar "tie oni servas eksterordinare bonan bieron".
- Mi ne kuraĝas elvagoniĝi, - respondas li - ĉar mi timas,ke mi ne retrovos mian vagonon.
- Rigardu ĝian numeron.
Jes,sinjoro,sed mia cerbo estas tre malrememorema.mi ĉiam forgesos numeron.
- Ho,kara mia,oni devas fiksi la numeron al ia konata historia aŭ simila fakto.Jen ekzemple,la numero de nia vagono estas 1038.En tiu jaro mortis Sankta Stefano, la unua reĝo de mia lando.Revenante do mi pensis pri la morto de Sankta Stefano kaj mi tuj retrovis mian vagonon.
- Bonego ideo - li ekkriis, kaj forlasis la vagonon.
Post kelkaj minutoj oni donas signon por ekirigo de l'vagonaro.Mia frapo ne estas ankoraŭ reveninta.Mi elrigardas tra la fenestro por serĉi kaj voki lin.Kaj kion mi vidas kaj aŭdas ? Li,ekscitita,preskaŭ plorante, peras la dejorantan policiston sur la perono:
- Sinjoro, pro la ĉiel, mi vinpetegas, diru al mi en kiu jaro mortis Sankta Stefano, reĝo de Hungarujo ?

(P. de Lengyel)

GRUPA VIVADO:

La estraro ekscias el Westerloo ke nia samideano kaj malnova klubano Roger Derdeyn edziĝis la 14-a de Aprilo 1942 kun fraŭlino Julia Onzia el Westerloo.Al la junaj geedziĝintuloj la estraro,nome de la tuta grupo,deziras plenan feliĉon.

& & & & & & & & & &

Nia samgrupanino Raymonde SCHOUTEET oficiale fianĉiĝis kun sinjoro ALBERT CORNUT el Cuesmes. Nome de nia E°-grupo la estraro elkore gratulas la lagefianĉojn,

& & & &

Voor de maand Mei kan het bestuur zyn leden al vast twee voordrachten aankondigen met alssprekers de makkers F.NORRO en G.MAERTENS:
I° - den 21/5/42/ handelt F.NORRO over "Tot een dieper inzicht in het muzikaal genot".
2° - Den 28/5/42 spreekt G. Maertens ons over "De huidige staat van het Esperanto".
Het bestuur verhoopt dat stellig aale leden zullen willen aanwezig zijn bij deze beide sprekbeurten.

& & & & &

AAN ONZE LEDEN: Heden hebt U reeds het 6de maandnummer van "ANTAUEN" ontvangen.Reeds een half jaar dus spaart ons bestuur zich moeite noch koster om de leden zooveel als eenigszins mogelijk al te verschaffen waar zij behoefte aan hebben: lezing - studie - literatuur - groepsleven en mededeelingen - ontspanning.

Zijn er onder onze leden die nopens het resultaat niet tevreden zijn? Zijn er die wenschen dat zekere rubriken worden weggelaten? Of uitgebreid? of ingekrompen? Of andere rubriken ingelascht? Hebben sommige onze leden geen origineele gedachten tot verbeteren, tot nog méér interessant maken van ons blaadje?Dat zij dan zonder uitstel hun wenschen en verlangens aan het bestuur laten geworden, en wij beloven alles in het werk te stellen om eenieder in de mate van het mogelijke genoegdoening te verschaffen. Niet enkel kritiek, niet enkel nieuwe ontwerpen, maar uitingen van tevredenheid, van instemming met de tot heden gevolgde werkwijze (voor leden die eventueel deze opinie aankleven) zouden het bestuur aangenaam zijn opdat het dan tenminste de mogelijkheid hebben zou een vergelijkende lijn te trekken om te besluiten of een verandering door ontwerp voorgesteld, door te voeren, opgevaar af van de meerderheid te ontstemmen die door een stilzwijgend toestemmen ons geen tastbaar richtsnoer heeft gegeven. Het bestuur hoopt dan ook van het meerendeel der leden een positief antwoord te verkrijgen. Dank bij voorbaat.

XXXXXXXXXXXX

STUDIEHOEKJE VOOR DE LEDEN:

Eerst nu is het ons opgevallen dat een leelijke flater neergeschreven werd in het eerste nummer blz.3 regel 16. Daar moet het vierde woord "onderwerp" vervangen worden door "voorwerp". En geen enkele lezer die ons de opmerking heeft gemaakt! Heeft wellicht niemand het studiehoekje gelezen ?